

La Laborista Esperantisto Arbetar-Esperantisten

Nr 1 | mars 2016

N-ro 1 | marto 2016

Tvåspråkig tidning utgiven av SLEA | Dulingva gazeto eldonita de SLEA



Innehåll | Enhavo

**Novajoj de libroservo
Mitt liv med esperanto
La Korto - la sekvantaĵo
Portu la ŝarĝon unu por la alia**

Arbetar-Esperantisten

är en tvåspråkig tidning på svenska och esperanto som ges ut av Svenska arbetaresperantoförbundet.

La Laborista Esperantisto

estas dulingva (sveda-Esperanto) membrogazeto de SLEA (Sveda Laborista Esperanto-Asocio).

Redaktionen / La redakcio:

Daniel Sandgren
Marcus Hansson

Retejo:

www.slea.se

SLEA en socialaj komunikiloj:

SLEA havas paĝon ĉe Visaĝlibro

Retpoŝto:

arbetaresperantisten@hotmail.com

La estraro de SLEA:

Prezidanto: Daniel Sandgren

Sekretario: Guy Coste

Kasisto: Marcus Hansson

Ceteraj estraranoj: Soile Lingman
Inga Johansson

SAT-perantino / SAT-kontakt:

Inga Johansson

Retpoŝto: ishim@hotmail.com



541-826

Svanmärkt trycksak
LaserTryck.se

Enhavo

sida / paĝo

• Gazeta informo	2
• Ledare / Redaktangulo	3
• La Korto – la sekvantaĵo	4
• Mitt liv med esperanto	8
• Portu la ŝarĝon unu por la alia	9
• Anslut dig till arbetaresperantisterna	14
• Novaĵoj de libroservo	15
• Lär dig esperanto!	16

Redaktionen vill även tacka alla andra som på något sätt bidragit till detta nummer och de som under året skänkt pengar till förbundet!

Org.nummer: 802401-1317

Plusgiro 5 31 60 - 8. (Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

**LASTA DATO POR LA
MANUSKRIPTOJ AL LA SEKVONTA
ELDONO ESTAS 2016-04-17.**

**SISTA DATUM ATT SKICKA IN
TEXTER TILL KOMMANDE NUMMER
ÄR 2016-04-17.**

Aper-plano 2016

marto, majo, aŭgusto, novembro

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

Ledare

Välkommen till årets första nummer. I detta nummer publicerar vi bl.a. en ny text, *Yarden – uppföljaren*, av Kristian Lundberg, översatt till esperanto. Just nu åter aktuell då filmatiseringen av *Yarden* nyligen premiärvisades på Göteborgs filmfestival (boken som SLEA gav ut på esperanto med titeln *La Korto* 2015). I denna text berättar författaren Kristian Lundberg om hur året på yarden kom att förändra hans liv och om vad som hände sen. Ni kan också läsa texten *Portu la ŝarĝon unu por la alia* som är skriven av Folke Fridell. Denna text är tidigare utgiven av SLEA på esperanto i boken *Sveda Novelaro*. Boken kan beställas till ett lågt pris. Soile Lingman bidrar med en kortare text om sitt liv med esperanto. I nästa nummer kommer ni bl.a. att kunna läsa om årsmötet som SLEA håller i mars i Stockholm.

Vi vill även passa på att välkomna alla nya medlemmar som tecknat medlemskap under årets första månader.

Redaktangulo

Bonvenon al la unua numero de la jaro. En ĉi tiu numero ni publikigas inter aliaj tekstoj, novan tekston, *La Korto – la sekvantaĵo*, de Kristian Lundberg, tradukita al Esperanto. Nun reaktuala ĉar dum la inaŭguro de la gotenbarga filmfestivalo okazis la unuafoja montrado de la filmo *La Korto* (la libro kiun SLEA eldonis en Esperanto dum 2015). En ĉi tiu tekstso la verkisto Kristian Lundberg rakontas pri la jaro en la korto kaj kiel tiu jaro ŝanĝis lian vivon. Nun li rakontas kion okazis poste. Vi ankaŭ povas legi la tekston *Portu la ŝarĝon unu por la alia* de Folke Fridell. Ĉi tiu teksto estas antaŭe eldonita de SLEA en la libro *Sveda Novelaro* kiu estas mendebla malmultekosta. Soile Lingman kontribuas kun mallonga teksto pri ŝia vivo kun Esperanto. En la sekvonta numero vi inter alie povos legi pri la jarkunveno de SLEA okazinta dum marto en Stokholmo.

Ni ankaŭ volas bonvenigi ĉiujn novajn membrojn kiuj membriĝis dum la unuaj monatoj de la nova jaro.

Atentu!

Pri la enhavo de La Laborista Esperantisto respondas la kontribuintoj mem.

Uppmärksamma!

Skribenterna ansvarar själva för sina texter. Det är alltså inte nödvändigtvis SLEAs åsikter som presenteras.

SLEA JARKOTIZO / MEDLEMSAVGIFT 2016

- Unuopa membro/Enskild medlem 100:-
- Familia membro/Familjemedlem 30:-

- Ungdomar upp till 20 år, arbetslösa, studerande och pensionärer 80:-

- Stödmedlemskap för organisationer 200:-

Membriĝu / Bli medlem!

Plusgiro 5 31 60 - 8.

(Sv.Arbeitar.Esperanto-förb.)

La Korto – la sekvantaĵo

Lastvendrede okazis la unuafoja montro de la filmo "La Korto" dum la inaŭguro de la gotenburga filmfestivalo. Por la verkisto Kristian Lundberg, la jaro en la Korto ŝanĝis la vivon. Nun li rakontas kio okazis poste.

Estas la fino de januaro. Hejmurbo. Havenurbo.

Mi konas la stratojn de la urbo, ĝiajn placojn, elveturejojn kaj enirejojn.

La temperaturo dum ĉitijaj tagoj varias inter nul kaj dek gradoj sub nul, Celsiuse. La ĉielo estas griza, akraj neĝkristaloj kirliĝas tra la frua mateno. Estas aparta malvarmo en tiu ĉi urbo. Pli kruda, pli malseka. Kiel doloro, kiu disigas la karnon de la ostoj, eniras la medolon. Mi vidas kelkajn aŭtojn en la loĝeja parkejo, iliajn glacikovritajn fenestrojn, malvarmajn motorojn. Mi scias kion oni sentas kiam oni skrapas centojn da tiaj fenestroj, startigas tiajn inertajn motorojn, scias kiel malvarmaj iĝas la seĝoj en aŭtoj ne uzitaj dum semajnoj, en malvarmo, en pluvo kaj neĝo.

Dum ekzakta kaj absoluta punkto en mia verkado, mi decidis eniri mian propran rakonton. Mi faris tion je mia propra nomo. Subite jen tute decida momento. Mi volis respondi pri mia teksto, garantii ĝin per mia subskribo.

Ne estas decido tute senkomplika, sed en tiu momento ĝi estis kaj simpla kaj memevidenta. Mi ne volis plu silenti, mi volis batali sen masko.

Facile ekestas problemoj se oni fikciigas biografian materialon, kiel oni faras ekzemple en la filmo "La Korto". Oni uzas veran bazrakonton, kiun oni poste ornamas kaj per fikcio kaj per biografiaj detaloj. Kio do estos vero? Oni ekhavas ian hibridon kiu nek leviĝas nek flugas. Ĉu estas mensogo kiu povas aperi kiel vero, ĉu estas vero kiu povas aperi kiel mensogo?

El la elita loĝejkvartalo "Doko" en Malmö, oni povas vidi la lokon nomita "la Korto"; inter la areoj estas havena enpasejo. La rekta distanco estas ducent metroj. Estas ĉirkaŭbarita aero laŭ la kajo. Barilo, gardista kaĝo, gardistoj kiuj patrolas laŭ la barilo. Verde pentrita pado iras de la enirejo al la manĝejo. Estas malpermesite iri alian vojon. Oni devas sekvi la indikojn. La tutan areon gardas kameraoj. Vi estas vidata, sed neniam mem vidas.

La Korto. Mi volis verki rakonton pri ĉi tiu areo, pri la homoj kiuj vivis tie. Mi volis ke ĝi estu tiel vera kiel nur eblas.

Kial estis tiel grave?

Unu respondo: kolero.

Mi ne antaŭe vidis homojn esti ĵetataj tien kaj reen, kiel fliperglobetoj en ludo ĉiam finita per *tilt, game over*, ne ĉi tiel, kiel sistemo. Ni estis ĉirkaŭ cent homoj, kies laboro estis movi aŭtojn en la aero.

Esence, neniuj restas el mia tempo tie. Ĉiuj foriris.

Antaŭ semajno mi iris taksie kun unu el miaj laborkamaradoj el la Korto, ankaŭ li ne sciis kial la telefono ne plu sonas. Ĉu li neglektis sian laboron, ĉu li estis denunciata, ĉu li maltrafis ion decidigan. Silento. Timo. Adaptiĝo.

La Korto estas giganta aliaranĝejo por nove fabrikitaj aŭtoj. Ni estis varia nombro da personoj, kiuj tagon post tago moviĝis tra la ĉirkaŭbarita, gardata aero.

Ni movis aŭtojn, purigis aŭtojn, kondukis aŭtojn inter diversaj parkejoj. La aero estis dividita en ia kvarangularo, kie ĉiu aŭto ricevis sian ekzakte indikitan *location*. Ne indikon, ne parkejon. Devis esti ĝuste *location*, anglalingve – kvankam temis pri tute la sama afero. Dum la monatoj kun neĝo estis foje preskaŭ neeble trovi la ĝustan lokon. La indikoj estis kovritaj de neĝo, de glacio.

Ni moviĝis en sespersona ”teamo”. Ni iris tra la aero en buseto, estis ellasataj ĉe indikitaj lokoj. Ni prenis parkitan aŭton kaj poste kondukis ĝin al ĝia nova *location*.

Estis varmege, estis neĝoŝtormo, estis pluvego. Dum aliaj tagoj oni tute ne pensis pri la vetero, sed dum ĉi tiuj tio ne eblis. Estis malbonaj, maldikaj vestoj, ŝuoj malofte de la ĝusta grandeco. Estis senprotekteco kiu trafenetris ĉion, precipe en la necerteco kiom da horoj kaj tagoj oni povos labori, la timo ĉu oni senintence malobservis iun regulon kaj tial malhavas laboron dum la venontaj tagoj.

Estinte en la Korto ĉirkaŭ ses monatojn, mi decidis ke mi volas verki la rakonton, al kiu mi poste donis la nomon de la loko.

La fono estas simpla, eble eĉ banala.

Mi kondukis novfabrikitan aŭton al ĝia indikita *location*.

Kiam oni parkis sian aŭton, estis gravege ke oni eliru kaj ekstaru apud ĝi. Tiel por averti ke la aŭto ne estis skanita, kio esti tasko de la teamestro. Kiel ajn estas la vetero, oni staru tie apud sia aŭto tie lokigita. Mi faris tiel, lokigis la aŭton, eliris, ekstaris apud ĝi kaj atendis ke ĝi estu skanata, ricevu sian novan indikon.

Estis oktobro, pluvegis. Forta vento venigis akvon el la havena enpasejo. Mi staris tie

kaj rigardis la gigantan areon, mi vidis kiel homoj staris en la pluvo kaj atendis la saman aferon kiel mi. Mi sciis en kiuj kvartaloj la plej multaj loĝis, sciis kiel aspektas iliaj tagoj, iliaj vesperoj. Kaj tiam dolorige ekvideblis ke okazis novliberala sistemŝanĝo. Ĝi ŝanĝis nin el vivantaj estaĵoj al signalstangoj.

Ni estis tio. Kelkaj signalstangoj metitaj en la pluvo, sen alia tasko ol ĝuste indiki la poziciojn de la aŭtoj. Gravis la aŭtoj. Ni estis nur molaj objektoj.

Ĝuste en tiu momento mi decidis ekverki, ne malplej ĉar estis preskaŭ ŝokiga kompreno. Mi ne vidis la tuton en la sistemŝanĝo. Sed tiam, en la sama momento, mi komprenis ankaŭ ke ni estis multaj kiuj lasis tion okazi. Ni ne plu estis homoj, ni iĝis objektoj, ni kiuj laboris en la Korto.

Tio okazis iom post iom, paŝon post paŝo. Ankaŭ tial mi volis enskribi mian propran nomon en la rakonto. Mi volis povi tute respondeci pri la teksto. Mi volis fari klaran kontrakton inter mi kaj la leganto. Mi volis aldoni biografian, politikan dimension. Ankaŭ tio iĝas tiel problema kiam oni fikciigas biografian tekston. Mallonge dirite: kio estas kio?

Ja la verkisto decidas kio estas vero. Estas lia teksto, lia respondeco, lia kontrakto kun la leganto. Imagigi al sio ion alian estas mensogi al si mem kaj al la leganto. Ankaŭ tial estas grave garanti sian tekston per sia persono. En tio estas moralo. Kiam mi kiel homo eniras mian propran rakonton, kompreneble ne pro tio la teksto iĝas pli justa. Sed pro tio, oni povas devigi min respondi. Eblas malsammaniere interparoli kun la verkinto, ĝuste ĉar ekzistas validecdimensio.

Sed kio okazis poste? Al ĉiuj amikoj kiujn mi ekhavis tie en la Korto? Kio okazis post tio? Kiam mi skribis mi ne sciis ke estos libro, eĉ malpli ke estos libro legota. Mi sciis nur ke mi volas rakonti pri ĉi tiu transformado, kie ni unue estis homoj sed poste objektoj, aĵoj.

Kaj la homoj kun kiuj mi vivis dum tiu tempo? Kien ili ĉiuj iris? Ĝuste tien kien oni povas imagi, en senlaborecon, senprotektecon. La Korto estas rakonto pri klaso, sekso kaj etneco. Estas ankaŭ rakonto pri malriĉo. Kiu havas malmulton, tiu perdu ankaŭ la minimuman sekurecon. La socia heredo kvazaŭ vipas la dorson, brulstampas ĝin. Jen unu el la kialoj pro kiuj la rakonto nepre estu biografio, ne kaŝita per la etikedo "romano".

Kio okazas, ne malplej kiam la biografio verkado pli-malpli ĉiam puŝas kaj frotas sin inter legantoj kaj ĝenroj, estas ke ĝuste la kontrakto inter leganto kaj verkanto iĝas malklara. Oni diras ke estas fikcio, do ne alimaniere interpretinda. Tio okazas ankaŭ se oni samtempe permesas al si uzi verajn personojn kaj lokojn en siaj tekstoj, homoj kiuj ankaŭ ne povas respondi – ĉar kiel oni respondu al fikcia teksto kiu rifuzas respondi pri siaj propraj asertoj? Mi volis prezenti respondon, mi volis paroli pri ekzemple la

laborluantaj entreprenoj kiuj kreas nesekurecon, kaj tute konkrete fakte nuligas la laborleĝaron.

Ĉar ni neniam estis dungitaj. Ni estis telefone vokataj.

Nin ne entenis la socia sekurecreto. Ni ne havis rajtojn, nur devojn.

Ĉu mi rajtis priskribi senprotektajn homojn en mia proksimeco kun nomo, loko? Ĉu mi povas skribi pri mortintoj kiuj ne povas defendi sin? Ĉu mi povas priskribi aliajn senrespekte? Jes. Tio estas mia respondo. Jes, mi povas – tiel longe kiel mi eniras mian propran tekston kaj respondecas pri ĝi kaj problemigas la simplan fakton ke la verkanto ĉiam estas pli forta.

La liberhavena viadukto, kiu ligas la havenan aeron al la urbocentro, nun estas tute senhoma, pasas nur unuopaj ŝarĝaŭtoj. La trafiklumoj intermite brilas flave. Certamaniere estas la horo nul, nur tiu densa mallumo, neĝo kiu falas, trafiklumo kiu signalas ke ĉiuj rajtas pasi ĉar apenaŭ iu ajn faras tion.

Mi ne scias kiom da fojoj mi staris ĉe ĝuste ĉi tiu viadukto kaj rigardis la centran stacidomon kaj la havenan areon, vidis la urbon fulmi kaj brili kun sia artefarita lumo, kaj ĉiam denove pensis ke la urbo ne plu apartenas al mi, se ĝi entute iam apartenis al mi.

Kiam mi laboris en la Korto, la aŭtoj staris atendante esti liverotaj al la cetera Nordio. Transportisto. Jen la termino por ni kiuj laboris tie, ni transportis aŭtojn dum ni ĉiuj nur sinkis ĉiam pli profunden en silenton, mallumon kaj forgeson.

La Korto ne estas loko kie oni povas per laboro liberigi sin, fari karieron, atingi siajn celojn. Oni estas tie kaj poste, iun tagon, ne plu.

Antaŭ iom da tempo mi vidis A:n apereti en sociaj komunikiloj. Li portis ian uniformon, kaj aŭtomatan armilon. Li aspektis gaja, preskaŭ feliĉa. Mi sukcesis kompreni ke li estas en Sirio, en armita lukto kontraŭ la "Islama Ŝtato". Aliulo fondis malgrandan vendejon kiu bankrotis post nur monato, tria persono iĝis senhejmulo en Gotenburgo. La socia heredo. Provi, lukti, kunpremi la dentojn, kaj vidi ke la aliaj ĉiam estas pli fortaj. Tio okazas ĉar ni ne unuiĝas kaj ŝanĝas la laborkondiĉojn.

Mi restis en la Korto ĝis la libro estis eldonita. Post tio, ili neniam plu telefonis. Mi ne restis pli ol unu jaron tie, sed tiu jaro por ĉiam ŝanĝis min.

de Kristian Lundberg

Tradukita de Gunnar Gällmo



MITT LIV MED ESPERANTO

Min far var esperantist, socialist och pacifist redan när han på 30-talet bodde i Finland. Jag har ärvt mina idéer från honom.

Som 16-åring började jag lära mig esperanto och brevväxla med esperantister i andra länder. När jag flyttat till Stockholm 1954 gick jag genast in i Arbetarnas Esperantoklubb och jag anslöt mig också till huvudorganisationen SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) i Paris. Där hade min pappa varit medlem ända från början.

De flesta medlemmarna i klubben var medelålders eller äldre och jag var nästan den enda i min ålder. Jag trivdes väldigt bra på klubblokalen Barnhusgatan 8 och på söndagsutflykterna med Arbaraj Fantomoj (Skogsspökerna).

Efter tre SAT-kongresser i Belgrad, Rotterdam och Helsingfors beslöt jag mig ändå för att lämna SAT och SLEA för att bli medlem i det ”neutrala” UEA. De arrangerade kongresser även i de socialistiska länderna och det tilltalade mig som fredsvän.


Min första UEA-kongress ägde rum 1959 i Warszawa med många deltagare. Efteråt följde London och Hamburg på 70-talet. Under 60- och 80-talen var jag inte aktiv som esperantist men från och med 1991 är jag styrelsemedlem i Stockholms Esperantoklubb. Jag är även UEA-delegat för min stad och värd för Pasporta Servo. Det betyder att unga esperantister som besöker Stockholm kan bo hos mig en eller flera nätter.

Esperanto har spelat en stor roll i mitt liv och som pensionär är jag fortfarande aktiv. Arbetarnas Esperantorörelse ligger mig varmt om hjärtat och därför är jag åter medlem även i SLEA.

Soile Lingman

Portu la ŝarĝon unu por la alia

de Folke Fridell



(Tiu ĉi teksto aperis en "Sveda Novelaro" eldonita 1950 de SLEA, esperantigita de Ferenc Szilágyi. Ĝi enhavas 20 tekstojn kaj vi trovas verkistojn kiel Ivar-Lo Johansson, Moa Martinsson, Harry Martinsson kaj Jan Fridegård. Vi povas aĉeti la libron de nia libroservo por 55 kr, inkl. sendokosto.)

Folke Fridell naskiĝis en la jaro 1904 kaj de sia junaĝo ĝis ĉ. sia kvardeka jaro li laboris kiel fabriklaboristo. Intertempe li kunlaboris la sindikatisman gazetaron. Tuj post la dua mondmilito aperis lia unua romano, kies afablan akcepton eĉ grave superis la sukceso de lia dua romano "Död mans hand", ("Mano de mortinto"). La "heroo" de tiu romano estas laboristo ĉe maŝino; li ne estas idealisto, sed senpatosa ĉiutagulo, kiun lacigas la laboro. Natura sekvo de la nuna sistemo. La solvo estas laŭ Fridell, ke nek la privata kapitalo, nek la ŝtato, sed la laboristoj mem transprenu la fabrikojn. Ke la libroj de Fridell vekis grandan diskuton, tio ne estas miriga kaj pruvas la seriozecon de tiu ĉi interesa verkisto, kies verkoj lasa neniun indiferenta.

Unu el ili estis malsana. Io tia, kompreneble, povas okazi; ĉiuj ne povas esti ĉiam sanaj. Malsanoj apartenas al la vivo. Nur la morto liberigas nin de la malsanoj.

Tiu ĉi okazo venis, kompreneble, maloportune, kaj ĉagreno densiĝis ĉirkaŭ la lito de la malsanulo. Ili kuŝis longe kaj malametis lin pro la malsano; ili opinis, ke li sabotas kontraŭ ilia kolektivo nun, kiam finfine ili ricevis bonan arbaran hakejon kaj akceptablan pagon. Samtempe ili iomete timis ankaŭ infektiĝon, ĉar li tre suspektinde tusadis kaj sputis amason da muko ĉirkaŭ sin.

Jonas, la gvidanto malfermis la kuraclibron, ĉar Persson volis tiel kaj malsanulo valorigas sian volon. Neniu el la uloj trotaksis la librojn, tiel ke tiu ĉi kuraclibro estis la sola trovebla, kiu koncernis literaturon. Kiam ili ĉiuj estis sanaj, Persson kutimis uzi ĝin, kiel submetaĵon, por lardotranĉado, ĝi estis stabila kaj dika kiel predikaro kaj donacis ioman nuancon da onklineca bonfara asocio al la kabana grupo.

Jonas blasfemis kaj malbenis ĉiujn, kiuj verkas kuraclibrojn, ĉar apenaŭ troviĝis iu malsanpriskribo, kiu ne agordis al la malsano de Adrian Persson. Preskaŭ ĉio, kio estis infekta, povis sternaĝi el ili, de ĉiutaga angino ĝis pesto.

Dum Persson havis iom da konscia ĉeesto, Gvid-Jonas legis laŭte, sed li finis subite, opiniante, ke la malsanulo kvazaŭ aplikus sin laŭ l diversaj priskriboj. Persson tuis dum

la duono de la nokto laŭ la ftizosimptomoj, aŭ li retenis la spiron, ĝis lia vizaĝo bluiĝis, kiam la laborestro legis la ĉapitron pri la angino tonsila.

Plej malfacilaj estis por la sanuloj la noktoj. Tage ili lasis lin kuŝi sola, ĉar oni ne povis oferi la tutan vivon por homfrato, kaj ili havis sian hakejon kaj siajn malsatajn idojn tie hejme. Sed dum la noktoj ili ne havis forton kuŝi kaj aŭskulti lian spirmankon kaj ĝemveojn. Kiam Persson vomis, ili alterne malplenigis la vazon por liberiĝi de la fetoro.

Li estis nur por malfaciligi ilian situacion, kaj ne montriĝis pliboniĝo. Persson iĝis nur pli malsana. Jonas havis respondecon kiel komisiito de la entrepreno kaj li volis lin rehejmigi trans multajn mejlojn jam komence de la malsano, sed tiam la malsanulo protestis kaj kredis ke ili volas lin senigi ankaŭ de lia hakejo.

Pli malfrue, poste, kiam la alta febro venis, iĝis tute neebbla lin transporti. Persson estis antaŭe tre utila por ili kaj eble tial ili malamamis lin nun, kiam li kuŝas senpova. Li estis tre lerta en la kuirado kaj bonega en la prizorgo de la laboriloj.

Sendube estis kelkaj, kiuj eksuspiris pro malpezigo tiun nokton, kiam Persson forlasis la lardodoron kaj la kuraclibron. Oni ne dormis poste, ĉar lit-ĉe-lite kun la morto oni iĝas maldorma kaj tiuj, kiuj malametis lin dum la malsanperiodo, nun post la fino de la turmentoj, ricevis konscienciproĉon. Tiel estas preskaŭ ĉiam.

La kontenteco subite finiĝis, kiam iĝis klare, ke Persson iel devos alveni al sia hejmo. Ne estis eble havi kadavron en la kabano, nek pro la parencaro, nek pro ilia propra trankvilo.

Pli ol 30 kilometrojn ili devis porti lin tra la arbaro, kie ne troviĝas veraj vojoj. Ili tiomgrade perdis la emon pro la penso pri tiu ĉi transporto, ke fine ili rezignis pri la laboro kaj decidis akiri kun sia stranga ŝarĝo.

Ne estas facile gastigi la morton inter vivantoj. Ho jes, ili ĉiuj provis sin senkulpigi, sed tute ili ne sukcesis. Angore ili kalkulis ĉiujn fojojn, kiam ili malplenigis la nokto-vazon post Persson, aŭ la fojojn, kiam ili donis al li helpon, ke ili forigu la pikojn de la konscienco. Ili rememorigis al si ĉiujn afablajn vortojn al la malsanulo kaj provis forgesi krudajn pensojn.

Por kelkaj estis fine tolereble. Ili faris sian devon, kaj eĉ kadavro ne havas rajton postuli pli ol kutiman kompaton.

Nun, kiam Persson estis mortinta, tiu afero estis tre grava.

Pro io ĉiuj pentis; ke ili ne helpis al Persson veni hejmen antaŭ la plej malfacila parto de la malsano. Eĉ kontraŭ lia volo ili estus povintaj influi lin. Nun ĉiuokaze ili devis prizorgi, ke li alvenu hejmen por esti enterigita. Ili ne kuraĝis havi mortinton kiel samĉambranon.

Pli frue ili estis ses viroj krom la laborestro. Ili estis tiom, sed nun unu el la ses estis mortinto. Ili portis alterne po du kaj estiĝis komplika sistemo por ŝanĝi la kvinan. Neniu kuraĝis peti la estron akcepti sian dornaĵon. Li estis koler-impulsa kaj forta. Cetere tio estus simpliginta la problemon, tiam ili estus povintaj havi tri-alternan dividon.

Jonas iris antaŭe kaj montris la vojon. Li faris sian parton al la lignaĵista laboro kaj nun incitiĝis, ĉar la transporto okazis tro malrapide, jen kaj jen li haltis kaj atendis la mort-transporton.

Jonas ne povis ne rimarki la furiozajn rigardojn, sed li tenis sin al sia estra digno kaj metis siajn manojn en la pantalonpoŝojn. Laŭ la kresko de la kolero malpliiĝis la respekto al la danĝera humoro de la estro. Fiŝist-Anders - Dio scias kial li havis tiun nomon, fiŝisto li ne estis - la kuzo de Jonas fine koleriĝis. Estro li estis ja tiu Jonas, sed nun ne temis pri arbfaligo, sed pri kadavrotransporto.

- Certe vi estas laca kaj elĉerpita, Jonas? Ĉu ni ne devus porti ankaŭ vin?

Tio efikis. Jonas ne havis forton kontraŭstari kaj akceptis sian dornaĵon, sed tio ne plibonigis la agordon. Malrapide ili marŝis, ĉar apenaŭ estis trovebla vojo, kaj oni devis fari longajn ĉirkaŭvojojn pro la printempa inundo. Dum la tagoj ili prosperis iel, kiam la suno pelis la obskurombrojn kaj diablaĵojn for, kaj la vento venis kun ĉiuj freŝaj spiroj de la printempo. La tagoj estis kvazaŭ salutoj al la vivantoj. Sed la noktoj estis malfacilaj. Tiam silentiĝis la birdkanto precize tiel, kvazaŭ mucida ĉifono ŝtopus la kolojn de la etaj mizeruloj.

Kun la silento venis ankaŭ la malbona konscienco de la vivantaj viroj. Dum tiuj malmultaj horoj, kiujn ili permesis al si mem, ne eblis dormi. Dormi ĉirkaŭ kadavro, kiu ĵus estis bona kamarado, ŝajnis al ili senmorala malsanktigo de la memoro. Kaj lasi lin sola kun la soleco ne konvenis.

Fine ili interkonsentis pare maldormi. Tiel ĉiuj povis iom dormi.

Unue ili portis lin surŝultre, preskaŭ dum la tuta unua tago ili faris tiel, ĉar tiel estis malpli penige, sed ĉirkaŭ la vespero, kiam ili ĉirkaŭiris akvokavon kaj la vento blovis kontraŭ ili, Fiŝist-Anders diris:

- Mi kredas, ke li odoras.

Baldaŭ ili ĉiuj sentis la fetoron kaj tiam ili decidis porti lin laŭkutime per la manoj. Estis fortostreĉa migrado kaj iom post iom oni forgesis la mortintan amikon pro siaj propraj zorgoj. Estis freneze peze treni sin antaŭen. Ili iĝis incitemaj kaj blasfemis unu kontraŭ la alia pro sia morta ŝarĝo, kiam la takto ne estis bona, aŭ iu ekglitis.

Tio atingis tiun gradon, ke ili silente malamis sian mortintan kamaradon eĉ pli ol dum la malsano. Tiam li povis almenaŭ eligi voĉon el si, sed nun li kuŝis supraklase-indiferente por krudaj pensoj kaj frosta malamo. Ili ne povis sibli kaj malbeni lin, kiel ili povus fari pri vivanto. Estas malfacile insulti mortinton, parte, ĉar li aŭdas nenion, parte, ĉar oni ne kuraĝas.

Sed ne malami lin ili ne povis dum la tagoj pasis kaj la penego pri la portilo iĝis pli kaj pli granda.

Nun iĝis tiel, ke Gvid-Jonas kaj Fiŝist-Anders iĝis paro, eble tio dependis de la timo ĉe la aliaj, aŭ ili opiniis, ke parencoj devus kunlabori. La kuzoj portis kune, gardis kaj ripozis kune.

Neniu el ili sciis, kiam la nigraj pensoj renkontiĝis; la zig-zagiro de la pensoj iĝas tiel stranga ĉe la homoj kelkfoje. Oni ne povas tie fari protokolojn, neniu kapablas meti sian nomon kaj daton kiel supr...

Ili havis noktogardon ĉe la portilo. Iom opale la lunlumo ekhelis jen kaj jen, inter rapidegaj printempaj nuboj kaj la ombroludo timdevigis ilin proksimiĝi unu al la alia. Ili duonkuŝis flank-ĉe flanke kaj pro la fetoro ili sidis laŭ la direkto de la vento.

-Baldaŭ ni estos duonvoje. Ĉe la Sun-rivereto.

Gvid-Jonas parolis mallaŭte kaj tion lastan pri Sun-rivereto li murmuris preskaŭ nur al si mem.

-Estos malfacile transiri tie kun Persson.

-Jes

Anders prenis pli firme la ŝnuron.

-Estos plej bone atenti, ke oni ne ekglitu.

-Jes.

Tiam eksilentis ankaŭ Anders. Tiu diabla, silentema kuzo ne sukcesos logi el li ion specialan, ne!

Longtempe ili kuŝis kaj batalis en si mem, sed tiam Jonas ne plu povis silenti.

-Estos plej bone, se vi kaj mi portos lin ĉe tiu danĝera loko.

-Jes. Akcidento okazas tre facile! Nur simpla mispaŝo. Ili ne diris iom pli, sed sufiĉis. La pensoj troviĝis tie kaj vere levi la rigardojn unu al la alia ili ne kuraĝis.

En la vilaĝo oni babilos - kompreneble. Sed rekte neniu kuraĝos akuzi la portantojn, se okazus akcidento. Tion eĉ mem Persson ne farus; kuŝi sub la ponteto ne estis la plej malbona afero.

Sed tio malpezigus la ŝarĝon de la vivantoj. Kompreneble unu el ili iros hejmen al la

vilaĝo kaj rakontos la funebran okazaĵon al la familio. Tio estos la tasko de Gvid-Jonas, pensis Anders kun iaspeca stranga agrabla sento. Sed la aliaj kvin povus returniĝi al la arbhakejo.

Je la deka horo la roto venis al la danĝera loko. Estis precize la vico de Jonas kaj Anders, preni sian penporcion kaj la kompanianoj ne povos diri ion, se akcidento okazus.

La ponteto estis glita kiel ŝmirsapo...

Malrapide, paŝon post paŝo palpadis antaŭen la kuzoj kun sia morta ŝarĝo. La printempa torento ŝprucis malvarmetan akvon sur iliajn ardiĝantajn vizaĝojn. Jonas iris unua. Li ja estis estro.

Ili pensis pri la sama afero: ili atendis la ekskuon de la alia. La etan mallertaĵon, kiu entombigus Persson ie sub la ŝaŭmantaj akvoamasoj. Sed neniu volis komenci. La timo kaj la malbona konscienco malhelpis ilin. Tiu strange egoista konscienco, kiu volis savi nur la propran pentminacon, sed tute ne estis kontraŭ tio, ke la alia havu ŝarĝitan konsciencon.

Du homoj sopiris fari tiun skuon, sed neniu kuraĝis, aŭ volis pro la timo. Estis tre grave teni malmole kaj firme, iri certa kaj lasi la alian komenci. Estis grave, ke oni sentu pro la venontaj sensonĝaj noktoj tute klare tion, ke mi, mi estas senkulpa.

Mi, Gvid-Jonas tenis tiel forte kiel eble...

Mi, Fiŝist-Anders provis teni denove, kiam la skuo venis...

Tial nenia skuo kaj nenia subita entombigo por Persson. La aliaj viroj transprenis la servon tuj post la ponteto. Estis peza laboro transigi la portilon tie. Estis eble pli peze atendi la akcidenton... Sed pri tiu batalo la aliaj sciis nenion. Nun ili bezonis ripozon.

La parenc-amo ne iĝis precize pli arda post la ŝanceliro. La malamo estis densa inter ili, silenta, koroda malamo. Sed kiam la lastan fojon ili ripozis antaŭ la atingo de la vilaĝo, la malamikeco finiĝis. Nun venis la kontenteco kaj konscienca paco. Ili estas farintaj sian devon kaj spitintaj ĉiujn nigrajn pensojn. Ili povis trankvile dormi dum la noktoj. Kaj Gvid-Jonas diris:

-Estis bonŝance, ke vi kaj mi havis la vicon ĉe la ponteto. La aliaj eble estus faligintaj la kompatindulon. Kun propra volo. Oni ne povas fidi la homojn.

-Sed ni certigis liajn realvenon kaj kristanan enterigon...

Pie kontente venis la vortoj. Sed tio estas nur la lingvo de la lipoj, post tio estis la insidaj pensoj:

-Diablo vi, vi nur atendis tiun skuon...

Persson ricevis belan enterigon kiel preskaŭ ĉiu, kiu suferis neĉiutagan morton kaj kiu havis multajn idojn por formi plorhoron ĉe la tombo.

Gvid-Jonas parolis pri la temo: Portu la ŝarĝon unu por la alia. La tuta arbhakista grupo streĉis sin kun la konscio, ke ĉiu faris sian devon.

La sekvan tagon ili returnis sin al sia bona arbhakejo. Kaj ili dormis bone dum la noktoj...

**Anslut dig till
arbetersperantisterna.
Bli medlem i SLEA idag!**

ERBJUDANDE!

Teckna ett medlemskap i SLEA för 100 kr så får du förutom vår tidning, Arbetar-Esperantisten 4 ggr/år, en bok på köpet. Välj en av följande böcker:


La Korto (en vittnesskildring om ett modernt statarsystem, mitt ibland oss, på esperanto) av Kristian Lundberg

Esperanto Direkt (lärobok för nybörjare, svenska-esperanto) av Stano Marček.

Erbjudandet gäller alla nya medlemmar t.o.m. 2016-12-31.

Betala in din medlemsavgift på följande plusgiro:
5 31 60 - 8 (Sv.Arbetar.Esperanto-förb.)

Kontakta oss: arbetersperantisten@hotmail.com



Novaĵoj de libroservo de SLEA

Libroj



Tamen ĝi moviĝas!

- Div. aŭtoroj

Dek du eseoj de dek aŭtoroj premiitaj en la Belartaj Konkursoj de UEA

Eldoninto: UEA

Prezo: 110 kr



Esperanto. Drömmen om ett världsspråk

- Bo Sandelin

Esperanto—drömmen om ett världsspråk ger en inblick i Zamenhofs fascinerande liv och beskriver samtidigt ett händelserikt skede i Europas kulturella och politiska historia. Dessutom skildras esperantorörelsens senare utveckling i världen och i Sverige.

Bo Sandelin är professor emeritus vid Handelshögskolan vid Göteborgs universitet.

Förlag: Dialogos

Pris: 200 kr

Por pli da informo vizitu www.slea.se | För mer information besök www.slea.se

**Sendu mendojn al la retpoŝtadreso aŭ al la adreso de SLEA sube:
Beställningar skickas till epostadressen eller postboxen nedan:**

Retpoŝto:

slea.smolando@hotmail.com

Adreso de SLEA:

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet
Box 64
563 22 Gränna
Sverige / Svedio

Afrankoj aldoniĝas je sendo de
libroj/broŝuroj.

Plusgiro: 53160-8

(Sv.Arbet.Esperanto.förb.)

LÄR DIG ESPERANTO!

Esperanto är ett planspråk vars främsta syfte är att underlätta kommunikationen för människor med olika språkbakgrund. Detta "brospråk" är relativt lätt att lära sig på grund av sin regelbundenhet och flexibilitet. Då esperanto inte tillhör någon nation eller något folk är det även mer rättvist att använda än de nationella språken.

ETT FUNGERANDE SPRÅK!

Ett språk dugligt för alla ändamål kan endast uppkomma ur en kollektiv process. Esperanto tillhör och formas av sina användare. Esperanto har använts i över 100 år och används idag i växande omfattning på internet. Dess användare finns idag i hela världen.

FÖR DEMOKRATISK KOMMUNIKATION!

Alla som har erfarenhet av internationell kommunikation vet att språket kan vara ett hinder, men med hjälp av esperanto kan vi umgås som jämlikar.

GÅ MED I SLEA!

Svenska arbetaresperantoförbundet, SLEA (Sveda Laborista Esperanto-Asocio), arbetar för att sprida det internationella språket esperanto inom arbetarrörelsen och bland dess sympatisörer.

Svenska ArbetarEsperantoFörbundet

Sveda Laborista Esperanto-Asocio

Box 64

563 22 Gränna

Sverige | Svedio



www.slea.se